## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, **vendrede** …

**la 4-an de decembro**
ĉe Clea Robin
ch. de la Culaz 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03 75

**la 8-an de januaro 2016**
ĉe Marie-Antoinette et Knud Sunier
av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56 / 079 210 97 75

**la 22-an de januaro 2016**
ĉe …

Ne forgesu aliĝi ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd#

## Poemo

Kara blanka frato,
Kiam mi naskiĝis, mi estis nigra,
Kiam mi kreskis, mi nigris
Kiam mi estas sub la suno, mi nigras
Kiam mi malsanas, mi nigras
Kiam mi mortos, mi nigros
Dum, vi, blanka homo
Kiam vi naskiĝis, vi estis rozkolora
Kiam vi kreskis, vi blankis
Kiam vi kuŝas sub la suno vi ruĝas
Kiam vi frostas, vi bluas
Kiam vi timas, vi verdas
Kiam vi malsaniĝas, vi flavas
Kiam vi mortas, vi grizas...
Kiu estas la kolorhomo ?

Leopold Sedar Senghor


## Laŭzana Esperanto – Societo


Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
**www.facebook.com/societedesperanto.lausanne**
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

decembro 2015 – n° 10

**Sabate, la 19-an de decembro je la 11-a**



## Zamenhofa Festo

**aperitivo en la loko de *USL***
rue des Pêcheurs 7, Ouchy/Lausanne

**Poste ni kunsidos ĉirkaŭ fonduo**




*Aliĝu antaŭ la 11-a de decembro, pagante **Frs 25.-** al la konto 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo). (La trinkaĵoj estos pagotaj de vi … surloke)*

*2016 – Feliĉo kaj ĝojo dum la festtagoj kaj la venonta jaro !*



**Lunde la 4-an de januaro**
*Diskuto pri nia venonta biblioteko, pri babiladaj rondoj venontjaraj kaj pri diversaĵoj decidotaj en la asemblo.*

**Lunde la 2-an de februaro**
*Ĝenerala asembleo ordinara*



Respondo al la enigmo de la pasinta informilo :
Kiom da ĉeestantoj ? Ili estas 7.
1 + 2 + 3 + 4 + 5 + 6 = 21 tintigojn !
(1 tintigo inter 2 personoj, 2 inter 3, ktp)

# Novaĵoj

La ekspozicio « Fenomeno Esperanto » ĉe la Forumo en Laŭzano plensukcesis.
Ni ricevis ĉirkaŭ 500 vizitantojn, kiuj, por la plimulto, montris grandan intereson pri la universala lingvo.
Pluraj planas sekvi instruadon de Esperanto. La aliaj havis okazon pli bone koni la ĉeeston kaj la vivon de la lingvo ne nur en nia regiono, sed tra la tuta mondo. Certe ĉiuj povos paroli pri ĝi per pli bona scio ĉirkaŭ ili. La prezentado estis ankaŭ tre bone prijuĝita. Ni ricevis multe da gratuloj.

Parto de la materialo de tiu ekspozicio restas disponebla por ĉiu, kiu deziras prepari iun saman. Pri tio, kontaktu François Randin (0041 76 411 14 55 aŭ ĉe sekretario@esperanto-lausanne.ch).

# La vorto "Kristnasko" tra la mondo

En esperanto, oni kutimas nomi la vintran feston de la 25a de decembro per la kunmetita vorto "Kristnasko", trovebla en la Fundamento, kaj kies senco estas evidenta.
Oni povas bedaŭri, ke tiu ĉi vorto estas en si mem peko kontraŭ la neŭtraleco. Efektive, estas objektiva fakto, ke Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro; eĉ malamiko de esperanto ne povas nei tiun fakton.
Pri la naskiĝo de Kristo, estas tute alia afero. Neniu dokumento atestas pri la ĝusta dato de tiu naskiĝo (eĉ ne pri la preciza jaro). Estas maksimume unu ŝanco el 365, ke Jesuo naskiĝus ĝuste en tiu ĉi dato. En la frua tempo de kristanismo, oni celebris la naskiĝon de Jesuo en datoj plej diversaj. En la 3a jarcento, Klemento el Aleksandrio proponis por tiu celebrado la 19an de aprilo; aliaj preferis la 29an de majo. Interesa rezonado kaŭzis, ke kelkfoje Kristnasko estis celebrita la 28an de marto: estas evidente, ke Dio kreis la mondon en la tago de la printempa ekvinokso (tiam la 25an de marto); cetere, en la Genezo, Dio kreas la Sunon en la kvara tago; ĉar Jesuo estas Suno de justeco, li povis naskiĝi nur en la kvara tago de la mondo, t.e. la 28an de marto. Nerefuteble !
Ne pli frue ol en la jaro 330, la celebrado de la naskiĝo de Kristo estis fiksita je la 25a de decembro far la papo Silvestro la Unua. Sed dum ankoraŭ unu jarcento, en la Orienta Eklezio, oni plu celebris ĝin la 6an de januaro, en la festo de Epifanio (vorto signifanta "surteriĝo"), kune kun la adorado de la magoj, la cirkumcido kaj la bapto. Oni notu, ke la nuntempa celebrado de Kristnasko far la ortodoksuloj la 7an de januaro, estas sen rilato kun Epifanio, sed estas kaŭzata nur de diverseco de kalendaroj : la 7a de januaro laŭ la internacia gregoria kalendaro respondas al la 25a de decembro laŭ la julia kalendaro, ankoraŭ uzata de la ortodoksuloj.
En Palestino, oni adoptis la nunan daton tre malfrue : nur ĉirkaŭ 570. Sed kial oni adoptis ĝuste tiun daton, la 25an de decembro ? Pro tio, ke ĝi estas la dato de la ĉefa festo de la antikva religio de la arjoj, la veda religio, ege pli malnova ol bramanismo. Oni nomis tiun feston la "Nokto-Patrino", kaj oni festis tiam la naskiĝon de la Suno (la plej mallonga tago de 1a jaro estas la 24a de decembro, do la Suno renaskiĝis la postan tagon). Ankaŭ en Persio, en la mazdaa religio, oni celebris en tiu tago la dion Mitra, la "Nevenkeblan Sunon".
Ni menciu ankaŭ interesan profetaĵon, maljunan je 5000 jaroj, disvastigatan en Oriento. Laŭ ĝi, la Mesio devis naskiĝi iun 15an de tiŝrio kaj morti iun 15an de nisano; kaj efektive, Jesuo mortis la 14an aŭ 15an de nisano. Do la Mesio povus naskiĝi, ekzemple, la 15an de tiŝrio 3756, kio respondas (krom se mi kulpas kalkuleraron) al mardo la 28a de septembro de la jaro -6 (minus ses). Simpla akcesora hipotezo, kiun mi volonte abĵurus, minacate je morto...
Celebri la naskiĝon de Kristo en la 25a de decembro estas do afero pure religia, ne historia. Tial oni rajtas bedaŭri, ke judoj, islamanoj, budhanoj, ktp, devas nomi, en la neŭtrala lingvo esperanto, la feston de la vintra solstico per ne-neŭtrala religia nomo. Sed Kristnasko estas fundamenta. . .

André Cherpillod
(Literatura Foiro, no 182 dec. 1999)

Notu : tiŝrio kaj nisano estas la unua kaj la sepa monato de la juda ankoraŭ uzata kalendaro.